

la vivo. Mi rompĉis mian propran protekton kontraŭ la krepusko.

Kompense ĝi akceptis tian porcion da energio, kiun ne kapablis engluti.

La mondo heliĝis, mia ombro saltis al la planko, kaj mi trapaŝis ĝin. La multkolora membrano de la sfero de la nego rompiĝis, ellasante nin en la kutiman mondon.

## Ĉapitro kvina

La sango per maldika strio ŝprucis al la tapiŝo. La knabo, velkinta en miaj manoj, estis ankoraŭ senkonscia, sed lia vizaĝo jam komencis rozkoloriĝi. La kato kriaĉis el la alia ĉambro, kvazaŭ oni lin buĉis.

Mi metis Egoron sur la divanon. Sidiĝis apude. Petis:

– Olga, bandaĝon...

La strigo forŝiriĝis de mia ŝultro, kiel blanka fulmo flugis al la kuirejo. Evidente, survoje ŝi eniris en la krepuskon, ĉar ŝi revenis jam post kelkaj sekundoj kun bandaĝo en la beko.

Egor malfermis la okulojn ĝuste en tiu momento, kiam mi prenis de la strigo la bandaĝon kaj komencis bandaĝi mian manon. Li demandis:

– Kiu tio estas?

– La strigo. Ĉu vi ne vidas?

– Kio al mi okazis? – demandis li. Lia voĉo preskaŭ ne tremis.

– Vi perdis la konscion.

– Kial? – Lia rigardo time trakuris laŭ la spuroj de la sango sur la planko kaj sur miaj vestaĵoj. Egoron mi sukcesis ne malpurigi.

– La sango estas mia, – klarigis mi. – Mi hazarde mistranĉis min. Egor, en la krepuskon necesas eniri akurate. Tio estas fremda medio, eĉ por ni, la

Aliaj. Kiam ni estas en la krepuska mondo, ni devas konstante elspezi la fortojn, nutrante ĝin per nia viva energio. Poiomete. Kaj se ne kontroli la procezon – la krepusko elsuĉos el vi ĉion vivan. Oni nenion povas fari, tio estas la pago.

– Ĉu mi pagis pli ol mi devis?

– Pli ol vi havis. Kaj preskaŭ restis en la krepuska mondo por ĉiam. Tio ne estas la morto, sed eble tio estas pli malbona, ol la morto.

– Mi helpu... – La knabo sidigis, por momento sulkiĝis: evidente, li sentis vertiĝon. Mi etendis la manon – li komencis bandaĝi la manradikon, malerte, sed diligente. La aŭro de la knabo ne ŝanĝiĝis, ĝi ĝis nun estis ŝanĝiĝanta, neŭtrala. Li jam eniris en la krepuskon, sed ĝi ankoraŭ ne sukcesis meti sian stampon.

– Ĉu vi kredas, ke mi estas amiko? – demandis mi.

– Mi ne scias. Ne malamiko, eble. Aŭ vi povas nenion al mi fari!

Etendinte la manon, mi tuŝis la knabetan kolon – li tuje streĉiĝis. Mi malfermis kaj demetis de li la ĉenon.

– Ĉu vi komprenis?

– Do, vi ne estas vampiro. – Lia voĉo iom raŭkiĝis.

– Jes. Sed tute ne pro tio, ke mi povis tuŝi la ajlon kaj arĝenton. Egor, tio ne estas la baro por vampiro.

– En ĉiuj filmoj...

– Kaj ankoraŭ en ĉiuj filmoj bonaj knaboj venkas la malbonajn. Knabo, superstiĉoj estas danĝeraj, ili sugestas falsajn esperojn.

– Kaj ĉu la esperoj povas esti verecaj?

– Ne. Laŭ sia esenco. – Mi leviĝis, tuŝis la bandaĝon. Nemalbone, ĝi sidis fortike kaj estis metita su-

fiĉe strikte. Post duonhoro eblos ensorĉi la vundon, sed dume estas tro malmulte da fortoj.

La knabo rigardis al mi de la divano. Jes, li iom trankviliĝis. Sed ankoraŭ al mi ne fidis. Amuza estis tio, ke la blankan strigon, kun senkulpa aspekto ekdormintan sur la televidilo, li eĉ ne atentis. Similis, ke Olga tamen enmiksiĝis en lian konscion. Tio estas do eĉ pli bona: klarigi, kio estas tiu blanka parolanta strigo, estus ekstreme malfacile.

– Ĉu ĉe vi troviĝos manĝaĵo? – demandis mi.

– Kia?

– Ajna. Teo kun sukero. Peco da pano. Ankaŭ mi elspezis multe da fortoj.

– Troviĝos. Kaj kiel vi vundiĝis?

Mi ne precizigis, sed ankaŭ ne mensogis.

– Speciale. Tiel necesis, por eltiri vin el la krepusko.

– Dankon. Se tio estas vero.

Arogon li havis, sed tio al mi plaĉis.

– Ne estas pro kio danki. Se vi pereus en la krepusko – mia estraro ankaŭ demetus de mi la kapon.

La knabo abrupte enspiris, leviĝis. Li tamen klopodis teni sin pli malproksime de mi.

– Kaj kia estraro?

– Severa. Nu, ĉu vi verŝos al mi la teon?

– Por bona homo oni nenion domaĝas.

Jes, li daŭre timis. Kaj kaŝis la timon post la nekontrolata arogeco.

– Tuje mi precizigas – mi ne estas homo. Mi estas la Alia. Kaj vi estas la Alia.

– Kaj en kio estas la diferenco? – Egor demonstre ĉirkaŭis min per la rigardo. – Laŭ aspekto oni ne povus diri!

– Dum vi ne regalos min per teo, mi silentos. Ĉu oni vin instruis akcepti la gastojn?

– Ĉu la nevokitajn? Kaj kiel vi eniris?

– Tra la pordo. Mi montros. Poste.

– Ni iru. – Evidente, oni tamen decidis regali min per teo. Mi iris, sekvante la knabon, senvole grimacante. Ne eltenis kaj petis:

– Tamen, Egor... lavu dekomence la kolon.

Ne returniĝante, la knabo ekbalancis la kapon.

– Tio minimume estas stulta, protekti nur la solan kolon. Sur la homa korpo estas kvin punktoj, kien povas mordi la vampiro.

– Ĉu vere?

– Jes ja. Kompreneble, mi parolas pri la vira korpo.

Ĉe li eĉ la nuko ruĝiĝis.

Mi enŝutis en la kruĉon kvin plenajn kulerojn da sukero. Palpebrumis al Egor:

– Verŝu al mi glason da teo kun du kuleroj da sukero... mi volas antaŭ la morto gustumi.

Evidente, li ne konis tiun anekdoton.

– Kaj mi kiam ŝutu?

– Kiam vi pezas?

– Mi ne memoras.

Mi proksikume pritaksis lin per la okulo.

– Ŝutu kvar. Vi forigos la komencan hipoglimion.

Li tamen lavis la kolon, kvankam tute ne liberiĝis de la ajlaodoro. Li petis, avide glutante la teon:

– Klarigu!

Tamen, ne tiel mi ĉion planis. Tute ne tiel. Observi la knabon, kiam lin kaptos la Voko. Mortigi aŭ kapti la vampirinon. Kaj konduki la dankeman knabon al la ĉefo – li ja ĉion povos bone klarigi.

– En antikvaj tempoj... – Mi misglutis la teon. – Ĉu tio similas al komenco de la fabelo, jes? Tamen tio ne estas fabelo.

– Mi aŭskultas.

– Bone. Mi komencos de la alia. Ekzistas la homa mondo. – Mi kapbalancis al la fenestro, al la

malgranda korteto kaj rampantaj laŭ la vojo aŭtoj. – Jen estas ĝi. Ĉirkaŭ ni. Kaj la plejmulto ne povas eliri el ĝiaj limoj. Tiel estis ĉiam. Sed iam aperas ni. La Aliaj.

– Kaj la vampiroj?

– Ankaŭ vampiroj estas la Aliaj. Tamen, ili estas aliaj Aliaj, iliaj kapabloj estas difinitaj anticipe.

– Mi ne komprenas. – Egor kapskuis.

Nu jes, mi ne estas kuratoro. Mi ne scipovas, kaj ja ne ŝatas klarigi evidentajn veraĵojn...

– Du ŝamanoj, manĝintaj venenajn fungojn, batas en siajn tamburinojn, – diris mi. – Delonge-antaŭlonge, ankoraŭ en la pratempoj. Unu el la ŝamanoj honeste trompas la ĉasistojn kaj la gvidoron. La alia vidas, kiel lia ombro, tremanta sur la planko de la kaverno en lumo de la lignofajro, ekhavas amplekson kaj leviĝas plenstature. Li faras paŝon kaj eniras en la ombron. Eniras en la krepuskon. Kaj plu komenciĝas la plej interesa. Ĉu vi komprenas?

Egor silentis.

– La krepusko ŝanĝas la enirintan. Tio estas alia mondo, kaj ĝi faras el homoj la Aliajn. Kaj kio vi iĝos – dependas nur de vi. La krepusko estas rapidmova rivero, kiu fluas ĉiujn direktojn samtempe. Decidu, kio vi volas iĝi en la krepuska mondo. Sed decidu rapide, vi havas ne tiom multe da tempo.

Jen nun li komprenis. La pupiloj de la knabo malplilarĝiĝis, iom paliĝis la haŭto. Bona stresa reakcio, kaj vere li taŭgas esti operacisto...

– Kio mi povas iĝi?

– Vi – iu ajn. Vi ankoraŭ ne decidis. Kaj ĉu vi scias, kiu elekto estas en la bazo? Bono kaj Malbono. Lumo kaj Obskuro.

– Kaj ĉu vi estas bona?

– Antaŭ ĉio mi estas la Alia. Diferenco inter la Bono kaj Malbono estas en la rilatoj al la ordinara homoj. Se vi elektas la Lumon – vi ne uzos viajn ka-

pablojn por la propra profito. Se vi elektis la Obskuron – tio iĝos por vi normala. Sed eĉ la nigra magiisto kapablas kuraci malsanulojn kaj trovi la malaperintajn sen informoj. Kaj la blanka magiisto povas rifuzi helpi al la homoj.

– Do mi ne komprenas, en kio estas la diferenco?!

– Vi komprenos. Komprenos, kiam vi aliĝos al unu aŭ la alia flanko.

– Nenien mi aliĝos!

– Malfruas, Egor. Vi estis en la krepusko, kaj vi jam ŝanĝiĝas. Tago-la-alia – kaj la elekto estos farita.

– Se vi elektis la Lumon... – Egor leviĝis, verŝis al si ankoraŭ unu tason da teo. Mi rimarkis, ke li la unuan fojon turniĝis al mi per la dorso sen timo. – Do, kio vi estas? Ĉu magiisto?

– Lernanto de magiisto. Mi laboras en la oficejo de la Nokta Patrolo. Ankaŭ tio estas necesa.

– Kaj kion vi povas fari? Montru, mi volas kontroli!

Nu jen, ĉio estas kiel laŭ la lernolibro. Li estis en la krepusko, sed tio lin ne konvinkis. Mizeraĵ foirteatraj artifikoj estas pli impresaj.

– Rigardu.

Mi etendis al li la manon. Egor haltis, provante kompreni, kio okazas. Poste rigardis al la taso.

De la teo jam ne iris la vaporo. La teo iom knaris, transformiĝinte je malgranda cilindro el malhel-bruna glacio kun enfrostintaj teeroj.

– Oj, – diris la knabo.

Termodinamiko estas la plej simpla parto de regado de la materio. Mi permesis al la broŭna movado refunkcii kaj la glacio ekbolis. Egor ekkriis, faligante la tason.

– Pardonu. – Mi saltleviĝis, prenis de la lavkuvo viŝilon. Kaŭris, forviŝante la flakon de la lino-leumo.

– De la magio estas nur malagrablajoj, – diris la knabo. – Pri la taso estas domaĝe.

– Tuj.

La ombro saltis al mi renkonten, mi eniris en la krepuskon kaj rigardis al la fragmentetoj. Ili ankoraŭ memoris la tuton, kaj al la taso tute ne estis destinite rompiĝi tiel rapide.

Restante en la krepusko, mi ŝovelis per la mano manplenon da fragmentoj. Kelkaj la plej malgrandaj, forflugintaj sub la kuirfornon, volonte alruliĝis pli proksimen.

Mi eliris el la krepusko kaj metis blankan tason sur la tablon.

– Nur la teon verŝu denove.

– Bonege. – Ŝajnas, ke tiu malgranda artifiko tre impresis la knabon. – Ĉu tiel eblas kun ajna aĵo?

– Kun la aĵo, preskaŭ kun ĉiu.

– Anton... kaj se io rompiĝis antaŭ semajno?

Mi senvole ekridetis.

– Ne. Pardonu, jam estas tro malfrue. La krepusko donas ŝancon, sed ĝin necesas uzi rapide, tre rapide.

Egor malsereniĝis. Estas interese, kion li rompis semajnon antaŭe?

– Ĉu nun vi kredas?

– Ĉu tio estas magio?

– Jes. La plej primitiva. Ĝin preskaŭ ne necesas lerni.

Verŝajne, mi diris tion vane. En la okuloj de la knabo aperis fajreto. Li jam pritaksis siajn perspektivojn. Profiton.

Lumo kaj Obskuro...

– Kaj la sperta magiisto, ĉu li povas ankaŭ la aliajn aferojn fari?

– Eĉ mi povas.

– Kaj regi la homojn?

Lumo kaj Obskuro...

– Jes, – diris mi. – Jes, ni povas.

– Kaj ĉu vi tion faras? Sed kial teroristoj kaptas garantiulojn? Ja eblas nerimarkeble trairi tra la krepusko kaj mortpafi ilin. Aŭ devigi memmortpafiĝi! Kaj kial homoj mortas pro la malsanoj? La magiistoj ja povas kuraci, vi mem tion diris?

– Tio estos Bono, – diris mi.

– Certel! Ja vi estas Lumaj magiistoj!

– Se ni faros ajnan sendube bonan agon – la Obskuraj magiistoj ricevas rajton por la ago malbona.

Egor kun miro rigardis min. Al li tro multo falis dum la lasta diurno. Li ankoraŭ ne malbone toleris.

– Bedaŭrinde, Egor, la Malbono estas pli forta laŭ sia naturo. La Malbono estas detrua. Ĝi detruas multe pli facile, ol la Bono kreas.

– Kaj kion do vi faras? Jen tiu via Nokta Patrolo... Ĉu vi batalas kontraŭ la Obskuraj magiistoj?

Mi ne rajtis respondi. Mi komprenis tion kun la sama mortiga klareco, kun kiu sciis: entute ne necesis malfermiĝi antaŭ la knabo. Necesis lin dormigi. Eniri en la krepuskon pli profunden. Sed ne doni, ne doni ajnajn klarigojn!

Mi nenion povas pruvi!

– Ĉu vi kontraŭ ili batalas?

– Ne tute, – diris mi. La vero estis pli malbona ol la malvero, sed mi ne havis rajton por la malvero. – Ni observas unu la alian.

– Ĉu vi prepariĝas por batali?

Mi rigardis al Egor kaj pensis pri tio, ke li estas tre, tre nestulta knabo. Sed ĝuste knabo. Kaj se diri al li nun, ke proksimiĝas grandega batalo de la Bono kaj Malbono kaj ke li povas iĝi nova ĝedajo\* de la krepuska mondo, do, li estos la nia.

---

\* Ĝedajo (analoge al samurajo) – adepto de la Orde-no de Kavaliroj-pacigantoj el la scienc-fikcia sagao de George Lucas «Astraj militoj».

Sed fakte, ne porlonge.

– Ne, Egor. Ni estas tre malmultaj.

– Ĉu la Lumaj? Pli malmultaj, ol la Obskuraj?

Jen nun li pretas lasi la hejmon, panjon kaj paĉjon, surmeti brilantan armaĵon kaj iri morti por la afero de la Bono...

– Entute – de la Aliaj. Egor... la bataloj de la Bono kaj Malbono daŭris milojn da jaroj kun ŝanĝiĝanta sukceso. Iam la Lumo venkis, sed ĉu vi scias, kiom da homoj, eĉ ne supozantaj pri la krepuska mondo, dum tio pereis. La Aliaj estas malmultaj, sed ja ĉiu Alia povas gvidi post si milojn da ordinaraj homoj. Egor... se nun komenciĝos la milito de Bono kaj Malbono – pereos duono de la homaro. Tial preskaŭ duonjarcenton antaŭe estis subskribita la kontrakto. La Granda Kontrakto inter la Bono kaj Malbono, Obskuro kaj Lumo.

Liaj okuloj rondiĝis.

Mi suspiris kaj daŭrigis:

– Tio estas mallonga Kontrakto. Tuj mi legos ĝin en la oficiala traduko en la rusan lingvon. Vi jam rajtas scii.

Duonferminte la okulojn, mi rigardis en la mallumon. La krepusko ekvivis, eknubis sub la palpebroj. Kaj malvolviĝis la griza tolo, kovrita per flamantaj ruĝaj literoj. La Kontrakton ne eblas prononci laŭmemore, ĝin eblas nur legi:

*Ni estas la Aliaj,*

*Ni servas al diversaj potencoj,*

*Sed en la krepusko ne ekzistas diferenco inter manko de la obskuro kaj manko de la lumo.*

*Nia lukto kapablas detruiri la mondon.*

*Ni faras la Grandan Kontrakton pri la armistico.*

*Ĉiu flanko vivos laŭ siaj leĝoj,*

*Ĉiu flanko havos proprajn rajtojn.*

*Ni limigas niajn rajtojn kaj niajn leĝojn.*

*Ni estas la Aliaj.  
Ni kreas la Noktan Patrolon,  
Por ke la fortoj de la Lumo observu  
la fortojn de la Obskuro.  
Ni estas la Aliaj.  
Ni kreas la Tagan Patrolon,  
Por ke la fortoj de la Obskuro observu  
la fortojn de la Lumo.  
La tempo decidus anstataŭ ni.*

La okuloj de Egor rondiĝis.

– Ĉu la Lumo kaj la Obskuro vivas en paco?

– Jes.

– Jen... vampiroj... Li denove kaj denove revenadis al tiu temo. – Ĉu ili estas la Obskuraj?

– Jes. Tio estas homoj, plene renaskigitaj de la krepuska mondo. Ili ricevas grandegajn eblecojn, sed perdas la vivon mem. Kaj subteni la propran ekzistadon ili povas nur per la fremda energio. La sango estas la plej oportuna formo de ĝia depumpado.

– Kaj ili mortigas la homojn!

– Ili povas ekzisti dank' al la sango de volontuloj-sangodonantoj. Tio estas kvazaŭ la sublimitaj produktoj, knabo. Nebonguste, sed ankaŭ nutrige. Se la vampiroj permesus al si ĉasadi...

– Sed oni atakis min!

Li pensis nun nur pri si... Malbone.

– Kelkaj vampiroj malobeas la leĝojn. Por tio ja bezonatas la Nokta Patrolo: observi la plenumon de la Kontrakto.

– Kaj ĉu simple, simple tiel la vampiroj ne ĉasas homojn?

Mian vangon batis vento pro la nevideblaj flugiloj. Ungoj eniĝis en la ŝultron.

– Kion vi al li respondos, patrolano? – flustris Olga el profundoj de la krepusko. – Ĉu vi riskos diri la veron?